# *Alvoko al la Dua Konkurso de koktelaj Majstroj de Havana Club*




**Foto: PL**

Havano, jan 26 (RHK) Kun la celo oma?i al kuba kulturo kaj kokteloj, estis malfermita la alvoko por la dua Internacia Konkurso de Koktelaj Majstro de Havana Club.

La marko Havana Club Internacional S.A (HCI), organizanto de la evento en alianco kun la Nacia Asocio de Bartenders de Cuba (ACC), etendis la inviton al kubaj kaj eksterlandaj drinkejistoj, kiuj pretas mezuri siajn kapablojn en spaco de novigo, ?uo kaj rigoro.

La Direktoro de Merkatado kaj Komunikado de HCI, Yuniel Delgado, deklaris ke la celo estas generi novan formon de konkurado ene de la komunumo de drinkejistoj en Kubo, anta?enigante kreivon kaj kamaradecon.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/economia/375072-alvoko-al-la-dua-konkurso-de-koktelaj-majstroj-de-havana-club

**Radio Habana Cuba**